EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO n-ro5>** ● AMO 82, 83 ●Unesko-kuriero. ● Konkurso Gorov ● Slovenio **< jan. 19**

# Pliaj informoj pri AMO 82 kaj AMO 83

**AMO 82:** jen detalaj informoj pri la ĉina asocio, ĈEL -- seminario por junuloj:

**Tago**: 28-a de januaro 2022
**Tempo**: 19:30- 21:30 UTC: 11:30-13:30, CET 12:30-14:30
**Platformo:** Zoom
**Temo:** La Z-generacio kaj Esperanta estonteco
**Enhavo:** ĉirkaŭ 5-6 ĉinaj junuloj el diversaj lokoj prelegos en la seminario, ili invitos ankaŭ delegiton el TEJO por partopreni la seminarion, SMG pretigos, kiel kutime, enkondukon por la seminario kaj alkroĉas ĝin nun, cele al pli bona kompreno.

***Haltigu ekstreme la presilojn! (HELP!)***

**Ĵusa informo! EKO kaj AMO – eterne diligentaj!**

**AMO 83:** Ni festos kaj esploros la internacian amikecon, honore al la Semajno de Internacia Amikeco (SIA), kiun UEA iniciatis en 1969.

**Tago:** Februaro 26.
**Tempo:** 12:00-15:00 CET (11:00-14:00 UTC). Ebligos partoprenon el Azio.
**Platformo:** Zoom (mastrumata el Kroatio).
**Temo:** Esperanto kaj Amikeco
**Enhavo:** Amikeco el sociologia vidpunkto, kio (ne) estas amikeco; danĝeroj de (mis)amikeco, amikeco kun aliaj kaj aliulaj, amikeco trans limoj. Spertuloj jam arigitaj el Japanio. Brazilo, Svislando kaj Kroatio. La seminario krome arigos ekzemplojn de praktika amikeco tra la Eo-komunumo. Fermos la sesion koncerto de Jomart kaj Nataŝa.

## AMO plia:

Verŝajna estas du seminarioj frue en aprilo. Certa estas seminario en Greziljono (Francio) en aprilo, iam inter la 1a kaj la 5a de la monato, kun temo 'Fervojo por daŭripova transporto'. Kunlaboras la franca filio de IFEF. Ni nun laboregas konkretigi la seminarion en Ĉeĥio (nova lando por AMO!) ene de la internacia Kongreso de IFEF kun simila temo. Tiumaniere la AMO-programo povos esti fiksita ĝis la fino de majo 2022.

## Unesko-kuriero elŝutebla

Aperis la kuriera numero de julio-sept de 2021 (n-ro 3). Ĝi estas elŝutebla de:

https://uea.org/revuoj/unesko_kuriero




La elŝuto okazas pere de la retejo de Unekso, por ke ili estu infiomitaj pri la kvanto de elŝutoj, Ili devas resti konvinkitaj, ke indas persisti pri Esperanto.

La ĉefa temo de la numero estas la viv-diverseco kaj kiel protekti ĝin.La kuriero citas ciferojn, ke specioj en minaco estas 25% de mamuloj, 19% de reptilioj kaj 33% de rif-koralo. Alia artikolo argumentas ke detruo de ekosistemoj spronis la aperon de Kovido kaj helpis ĝian disvastigon. Alia artikolo resumas la rezultojn de la arbarfajroj en Aŭstralio. Kiel ĉiam la teknika kvalito estas altega, kune kun belegaj kaj okulfrapaj bildoj.

## Refoje la literatura konkurso Hristo Gorov

Hristo Gorov- Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj. La konkurso estos por rakonto kaj eseo. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkita en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton kun supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman – 12-punktaj. La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Sendu viajn kontribuojn ĝis la 31-a de oktobro 2022 al adreso: e-mail:
modest@abv.bg
aŭ al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio, BG-1229, Vrabnica 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

## Oni luktas en Madagaskaro

La elsendo N°115 de Aminda Radio Esperanto proponas al vi la duan parton de sia artikolo pri la malagasa lukt-arto Diamanga. kiu ŝajne historie rilatas kun la brazila *capoera*. Ni prezentas al vi ankaŭ la internacian projekton ESPERANTO PLUS kun ĝiaj ĉefaj aktivuloj en Afriko. Aliaj programeroj povas interesi vin sed necesas ilin aŭskulti se vi volas scii pri Malagasio kaj ĝia popolo.

https://youtu.be/KMmmXVdqUwU

## Slovena libroeldonado kaj nova biblioteko

Mirinda prezentaĵo estis farita de Ostoj Kristan. Ĝi estas alkroĉita en formo de PDF. Ĝi prezentas la tradukitan infanlibron 'Alma' aĉeteblan kontraŭ €12. Sub la prizorgo de la Centra Biblioteko de la urbo Celja, kies evoluo estas montrita. Prezentiita estas ankaŭ la libro 'La kroniko de Visoko'. Plia novaĵo: la sidejo de la slovena LA renovigis sian sidejon, instalis novajn librobretojn kaj renovigis per tio sian bibliotekon. Ĉio videbla bilde en la alkroĉita PDF.

## Francaj infanoj prezentas sin per Esperanto

ILEI bele agas en Francio. Jen mirinda filmo el la regiono de Besançon en orienta Francio. Mirinde estas, ke ne nur la instruisto kaj lernantoj parolas la lingvon, sed ankau la aganta lernejestro kaj vic-estro.

La lernantoj lernis Esperanton de Emmanuel Desbrières kaj kolegoj.

https://www.youtube.com/watch?v=n25tMwWrXSY&ab_channel=Esperanto%2BEdukadoILEI

## ILEI donas servon diskonigi edukajn filmojn

ILEI havas kanalon ĉe youtube https://youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI

Vizitu ĝin, spektu la filmetojn tie. Filmetoj pri instruado kaj uzado de Esperanto en via lernejo aŭ universitato estas bonvenaj!

Proponu erojn al Alessandra MADELLA, vic-prezidanto de ILEI

*a.madella@tiscali.it*

## IKEF – unu aliro por la jaro per Tencent

Ligilo: https://meeting.tencent.com/dm/POSmsnxMLrvX
Kunvena kodo: 734-3716-2461 (dumjare samas en 2022)
**fakte, dum 2022 - 2024 vi ĉiam aŭ iu-ajn-tempe povos eniri por babili senlime kun viaj invititoj, diference tiam en DK kun pli multaj aŭskultantoj.

## Plia muzika kaj poezia prezento por rigardi

Ĉio estas amo (SMG: kial mi malkonsentu? Mankas nur la majuskligo ☺)
https://youtu.be/09Pp-2uCogE

mz

**Lode van de Velde recitas siajn du poemojn:**
"Laŭ la vent' " kaj "en sennombraj revoj", por la "Galerio de gepoetoj".
https://youtu.be/shwLssXdugc

**La virinoj adoras lin**
(3-minuta terapio per ridetoj)

https://youtu.be/jbIDJudEXHk

mga




## Juna amiko – malsufiĉe aprezata rimedo kaj lernilo

Jen fizike presata revuo por bonvenigi novajn lernantojn – multjara servo de ILEI al la movado!. Abonu ĝin nun por permesi al ĝi servi nin pluen! Perantoj en multaj landoj.

Ni laboras malkovri, de kie eblas elŝuti tion. Intertempe petu ĝin de estrarano de ILEI aŭ la redaktoron.

## Spomenka pri Mostar kaj Ĉinio


Jen la dua parto de la intervjuo al Spomenka Stimec en Ĉina Radio Internacia, pri Hodler en Mostar, proponita por tutmonda simbola legado dum la Tago de la Esperanta libro 2021 fare de ILEI:

http://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20220104/726255.html

Informo de Jozefo Nemeth, la hungaraia sekciestro

**La jaro 2022: Jen tio muzike: kunkantu: DU DI DU DU!**

Dankon al Perlo Miela pro la notoj



========= vortoj: 965 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.